

Enskribo pri la 14a komitata

kunveno okazinta la 12an de febr. 1951 en kafejo Slavia. Komenco je la 21.30 h, ĉeestis gesamideanoj: Vondroušek, Adamcová, Zitová, Borkovec, Sedlák, Nečas, Kořínek, Frýbert, gaste s-ino Vondroušková. S-o Kořínek tralegis pasintkunvenan enskribon kaj la sekretarian raporton por la ĝenerala kunveno. Estis decidite aldoni unu plian frazon al la raporto kaj poste ĝi estis aprobita. S-o Borkovec en sia kasista konciza raporto anoncis la suman spezon de la kluba kaj kongresa kaso por la jato 1950; ĝi estas ĉ. Kčs 750.000,-. Poste oni interkonsentis pri jena nova kandidatlisto: Josef Vondroušek, Josef Friedrich, Marie Adamcová, Tomáš Borkovec, Jiří Kořínek, Rudolf Nečas, Nelly Zitová, Frant. Frýbert, Drahomíra Chlubnová, Libor Kovář, revizoroj Miroslav Němec kaj Stanislav Sedlák.

Finite je la 23a horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo pri la ĝenerala kunveno okazinta la 13an de februaro 1951 en la klubejo en hotelo Passage.

Post saluto de la ĉeestantaj klubanoj kaj du gastoj resumas la kluba prezidanto s-o Vondroušek la kluban agadon en la pasinta jaro kaj s-o Kořínek legas la sekretarian raporton. Sekvas prikongresa raporto de s-o Friedrich kaj la kasista raporto de s-o Borkovec el kiu estas menciinda la konstato, ke la kluba kaj kongresa spezoj atingis sumon de 750.000,- Kčs. La kongreso rezultigis profiton de ĉ. 18.000 Kčs, kiuj fontis plejparte el donacoj. La sumo estas uzita por propagandaj celoj, ĉefe por la stando en la foirejo de la Ekspoziciaj foiroj de Brno. - Sekvis raporto de s-anino Zitová kiu anoncas, ke la biblioteko kreskis je 42 novaj libroj kaj havas nun 350 volumojn. Ĉiuj raporto estis aprobitaj kaj ricevis absolutorion. S-o Nečas legas la konstaton de la revizoroj s-oj Němec kaj Sedlák, ke la kluba kaso estas en ordo. Al la kasisto estas donata absolutorio. La ĝisnuna komitato rezignas. S-o Ambrož post kvinminuta paŭzo ekvidas la kunsidon. Li proponas elekti prezidanto la meritplenan kaj spertan ĝisnunan prezidanton Josef Vondroušek kaj la elekto estas ĉievoĉe balotita. Poste estis per ĉiuj voĉoj elektita jena nova komitato: Josef Friedrich, Marie Adamcová, Tomáš Borkovec, Jiří Kořínek, Rudolf Nečas, Nelly Zitová, Frant. Frýbert, Drahomíra Chlubnová, Libor Kovář; revizoroj Miroslav Němec, Stan. Sedlák. S-anoj Vondroušek kaj Friedrich atentigas pri la ĵus komenciĝantaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj admonas la membrojn klopodi varbi pliajn kursanojn por ambaŭ ne sufiĉe partoprenataj kursoj kun po 11 aliĝintoj. S-o Vondroušek anoncas, ke ĵus la hotela administranto postulis, ke ni pagu por ĉiu horo da restado en la klubejo 200,- Kčs laŭ la deklaro de la Supera Prez-oficejo. Plejbonokaze, konsiderante ĉiujn favorigojn, laŭdire, por unu tuta vespero ni devos pagi 150-200 Kčs. Tio estas por la klubaj financoj ne eltenebla kaj ankaŭ la anaro ne povus pagi por ĉiu klubĉeesto tian granda enirpagon. Oni decidis plendi kontraŭ tio, klopodi resti en Passage, sed por ia modera, tolerebla kosto. Alimaniere ni devus elekti novajn eblaĵojn.

Finite je la 22.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo pri la komitata kunveno

okazigita la 15.3.1951 en hotelo Slavia je la 21.30 h.

Ĉeestis gesamideanoj Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Borkovec, Kořínek, Chlubnová, Frýbert, Kovář, gaste s-ino Vondroušková, prof. V. Scheiber. Post malfermo far' de s-ano Vondroušek, s-o Kořínek legas la enskribon pri la lasta komitata kunveno. S-ano Kořínek poste prezentas la jenan liston de la disdivido de funkcioj. Vicprezidanto s-o Josef Friedrich, la sekretario Jiří Kořínek, IIIa sekretario s-ino

Marie Adamcová, kasisto s-o Tomáš Borkovec, bibliotekistino s-anino Nelly Zitová, komitatanoj Rudolf Nečas, Drahomíra Chlubnová, Frant. Frýbert, Libor Kovář, revizoroj s-anoj Miroslav Němec kaj Stanislav Sedlák. La propono estis ĉiesvoĉe aprobita kaj la nova komitato per tio ekfunkcias. S-ano Vondroušek raportas pri la kursoj, s-ano Friedrich havas 14 kursanojn en sia kurso por progresintoj en Král. Pole, s-ano Vondroušek 9 komencantojn. En konekso kun la kursoj s-ano Friedrich proponas pensi pri novaj pli efikaj varbmetodoj.

Poste oni diskutas pri la programoj de la ambaŭ artvesperoj okazigotaj la 10an kaj la 14an de aprilo. Por la unua prezentas la programon s-ano prof. Scheiber; oni trovas ĝin tre bela kaj celkonforma. Estas nun konstatate, ke s-anino Borská malsanas kaj kuŝas en la hospitalo kaj ne estas ankoraŭ tute certe ĉu ŝi ĝis tiu templimo estos plene sana por povi kunroli. Ankaŭ ankoraŭ 4 kanttradukoj farotaj de s-ano dro Pumpr ne elvenis, kaj fine s-anino Novotná ankoraŭ ne konfirmis sian kunlaboron. Espereble ĉio ĉi estos ĝustatempe ordigita. Poste s-ano Kořínek prezentas la programon por la sabata Amika kunveno kun artisma programo antaŭ la Regiona Kunveno. La programon fiksas s-ano Scheiber, kaj ĝi havas same kiel la marda programo, 13 programerojn. Aŭdiĝas opono, ke la programo estas tro longa kaj oni konsideras, kion oni povus elimini el la programo. Tamen oni fine trovas ĉion prezentinda kaj ni interkonsentas lasi la programojn en la origina kunmeto, sed fiksi komencon je la 1930 kaj insisti pri akurata (laŭeble) komenco. S-ano Kořínek promesas prizorgi la ciklostiladon de la programoj, tuj kiam ni ricevos aprobon far' de la oficoj. - Finite je la 23a horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo pri la Komitata kunveno okazinta

la 3an de julio 1951 en hotelo Passage je la 22a horo. Ĉeestis ge-anoj Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Zitová, Chlubnová, Borkovec, Kořínek, Kovář, Frýber.

S-o Vondroušek raportas, ke li estis invitita antaŭ 14 tagoj al la Societa referanto de S.N.B. kaj oni insistis, ke ni senprokraste likvidu nian memstaran klubon kaj kunfandiĝu kun iu amasa organizo aŭ uzina klubo. S-o Vondroušek parolis kun la estro de Komenského osvětová akademie, s-o Polanka, kiu montris emon akcepti nian Klubon en nomitan Klerigan Kunularon. Ni rajtus plu kunveni en Passage, kondiĉe, ke ni mem pagos al ni la klubojn. Ankaŭ aliajn monrimedojn la K.O.A. ne povos al ni disponigi. La komitata kunveno plene aprobas tiun ĉi solvon kaj oni tuj morgaŭ dissendos invitilojn por la eksterordinata ĝenerala kunveno, kiu okazos la 10. n.m. kaj aprobos la kunfandiĝon. En diskuto s-o Borkovec volas scii kiagrade estos ebla nia memstara financa mastrumado post la kunfandiĝo. Klarigojn pri nia estonta agadlibereco petis s-anoj Kořínek kaj Friedrich.

Finite je la 23a horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo pri la eksterordinara ĝenerala kunveno

okazinta la 10-an de julio 1951 en klubejo de hotelo Passage je la 20a horo 30 min.

Ĉeestis 32 gesamideanoj.

S-o Vondroušek raportas pri la neceso likvidi memstaran ekziston de nia klubo konforme al la nova societa leĝo. Ni klopodis prokrasti tiun decidon ĝis prezentiĝos favora okazo por kunfandiĝo, sed la koncerna referento ĉe SNB insistas pri la senprokrasta kunfandiĝo resp. aliĝo al iu amuza organizaĵo aŭ uzina klubo. S-o Vondroušek intertraktis kun la estro de Komenského osvětová akademio s-ro Polanka kaj tiu promesis, ke la akademio nin volonte akceptos, se ne ekestos por la Kleriga Kunularo ia aparta laboro aŭ

elspezoj. Ĉar ni volas labori kaj ekzisti, ni faras ĉi tiun, por ni plej avantaĝan aranĝon; ni laŭpromese povus plu kunvenadi en Passage kaj labori kiel ĝis nun. S-o Vondroušek invitas la ĉeestantojn al aprobo. S-o Čížek demandas pri funkciado kaj okupiĝo de Komenského osvětová beseda kaj s-o Vondroušek klarigas ke estas kleriga societo kaj s-o Vondroušek klarigas ke estas kleriga societo, kiu okazigas prelegojn, kursojn. S-o Friedrich pledas por kunfandiĝo kun Komen. Kleriga Kunularo, ĉar ĝi estas por ni tre favora. Ankaŭ s-ro Polanka havas favoran sintenon al Esperanto. Post la proponita voĉdonado, oni voĉdonas kaj estas ĉiesvoĉe akceptite. S-o Vondroušek anoncas, ke ni informos pri la decido de la Ĝenerala Kunveno la instancojn. S-o Kořínek legas sekretarian raporton, kiu estas aprobata. Same la kasista provizora raporto de s-o Borkovec estas aprobata. Nia financa konklavo estas 2199.40 Kčs. Estas aprobite donaci la blokitan bonhavan de la Klubo ĉ. 8500,- Kčs al la ŝtato. Finite je la 21.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo pri la komitata kunveno la 4an IX. 1951 en klubejo en Passage.

Komenciĝo je la 22a h. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Adamcová, Zitová, Friedrich, Kořínek, Borkovec, Chlubnová, Kovář.

Enkonduke s. Vondroušek atentigas, ke necesas jam fiksi la programon por la venontaj monataj kaj li insistas ĉiujn anonci siajn kontribuojn al la programo. Poste li sciigas, ke aŭtune ni volas rememori per valora solena artvespero la 50 jaran datrevenon de fondiĝo de nia klubo. S. Friedrich raportas, ke laŭ iniciato de Dro Pitlík oni invitu al tiu ĉi solena vespero ĉiujn pionirojn de E-movado ĉe ni, ke s-anoj kiel Čejka, Šupichová ktp. Ĉar s-ano Borkovec plendas, ke la kaso estas malplena oni ne povus al la invititoj pagi la vojaĝon. Laŭ interkonsento estas intelektita dato 10a de novembro por la artvespero. S-ano Vondroušek emfazas, ke E kursojn okazigatajn de Kom. osv. akad. Tiucele li ankaŭ pretigis jam la afiŝojn post interkonsento kun s-ano Friedrich, ĉar ka tempo urĝis (la kursoj komenciĝas la 10an IX).

Li montras la afiŝojn kaj petas la postokazan aprobon de tiu ago kaj la komitatanoj plene aprobas ĝin. Ĉiu klubano tamen zorgu pri individua varbado ĉar tiu laŭ ĉiuj spertoj estas plej efika. Ĉar hotelo Passage fariĝas armea posedaĵo ni devas antaŭvidi neceson forlasi nian multjaran tradicion kunvenojn. Tiucele ni zorgu jam tuj pri la nova klubejo. Ges-anoj Friedrich kaj Adamcová prenas sur sin la taskon informiĝi en hotelo Slavia kaj aliloke pri la eventualaj ŝancoj. Plue s-ano Friedrich legas karton de Dro Izak kun peto esprimita ĉe la Regiona Kunveno en Lipt. Svät. Mikuláš, kaj jam interpretita de s-ano Kořínek, ke nia klubo akceptu patronecon aŭ adoptu la klubon de Košice. Oni akceptas tiun proponon kaj volas ĉiel helpi al ekprospero de tiea klubo. S-ano Friedrich promesas tiusence respondi al Košice. La 13.9. estos la poezia vespero, ĉiuj kunhelpu, elektu kunvenan poemon kaj proponu antaŭe por envicigo en la deklamotajn poemojn. Finite je la 23.20 h.

Enskribis Jiří Kořínek